

Pri la nova revuo FONTO
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 471, 1981.04.16 & 18

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintjare, en la monato oktobro, estis lanĉita nova revuo sub la titolo FONTO. Tiu ĉi "monata beletra revuo" eldonita en Brazilo, kvankam ĉefredaktorita en Skotlando fare de William Auld, tiel precizigas sian programon:

A.- "...Nia celo estas akceli la beletran literaturon en Esperanto. Ekzistas jam revuoj, cetere tre bonaj, almenaŭ parte literaturaĵ; tamen ŝajnas al ni, ke ĝuste la beletra literaturo ankoraŭ bezonas sian propran organon... Koncerne la originalan beletron, ni esperas kunlaborigi iom post iom ĉiujn talentojn el ĉiuj partoj de la mondo (kiel siatempe sukcesis fari "Literatura Mondo"). Koncerne la tradukojn, ni esperas aperigi tradukojn el la plej diversaj lingvoj kaj kulturoj. Nia sola postulo estas, ke tiuj tradukoj legiĝu kvazaŭ originale verkitaj en Esperanto..."

Cl.- Ĉu tiu ĉi programo estas sufiĉa? Ni iom dubas. Kaj la tralego de la unua numero de FONTO nur firmigis nian konvinkon, ke por renaskigi revuon similan al "Literatura Mondo" oni devas havi iom pli precizan celon. Ne sufiĉas publikigi iel ajn dudekon da kontribuaĵoj poeziaj kaj prozaj, originalaj kaj tradukitaj, por konvinki la leganton abon.

A.- Por vere komprenigi la kulturan signifon de beletraĵo apartenanta al fremda literaturo, la enkonduka antaŭparolo pri la aŭtoro, pri lia verkaro kaj pri la elektita antologia peco estas minimumo absolute necesa. FONTO neglektis tiun ĉi dimension de sia eldona tasko, kaj pro tio ni ricevas la impreson, ke la hazardo grupigis la tekstojn, kiuj havis la honoron aperi en la unua numero de FONTO. Ili estas kvazaŭ aerolitoj malsamdevenaj, kiujn oni iel ajn vicigis en muzea vitrino. Eble la kolektinto komprenas ilian ekzaktan mesaĝon. Por la aliaj homoj, pro manko de helpaj klarigoj, tiu ĉi mesaĝo restas enigma.

Cl.- Nur koncerne la nomon de unu verkisto, tiu de la portugalo Guerra Junqueiro (gera ĵunkejro) estas donita indiko pri la maniero prononci tiun fremdan nomon. Por la aliaj la leganto mem divenu. Kaj ĉar ni ne havas tiun ĉi diven-kapablon, ni preferas silenti pri la aŭtoroj de la esperantigitaj tekstoj kaj eĉ pri ties tradukistoj, ĉar ni nur povus fuŝlegi tiujn ĉi proprajn nomojn.

A.- Se la numero unua de FONTO estus alportinta sciigojn pri la prononco de tiuj nomoj, kaj pri la homoj, kiujn ili konkretigas, oni povas esti certa, ke la plimulto de la tralegintoj ĝin konservus, ĝi estus por ili utila instrumento. Ni atendas de monata beletra revuo tiajn servojn, sed FONTO ne ŝajnas fariĝi tia helpilo. Bedaŭrinde, ĉar tian beletran ilon ni bezonegas. Kaj ju pli Esperanto disvastiĝos, des pli tiujn ĉi bazajn sciigojn ni bezonos, eĉ se ni konas plurajn lingvojn.

Cl.- Ni revenu al la enkondukaj vortoj de William Auld. Koncerne al la recenzarto, la revuo FONTO tiel ĉi precizigas siajn intencojn:

A.- "Recenzojn ni aperigos iom longajn. Ŝajnas al ni, ke tio tre mankas en Esperanto nuntempe: la plimultaj "recenzoj" estas apenaŭ pli ol mencioj. Pro tio ni ne recenzos ĉiun aperontan verkon, sed nur tiujn, kiuj laŭ nia opinio meritas pli profundan atenton. Finfine, en ĉiu jaro tiaj verkoj ne aperas ege multnombro."

Cl.- Bedaŭrinde la recenzo, kiun William Auld ĝuste aperigis en la unua numero de FONTO koncerne la verkon de Fernando de Diego "**Pri Esperanto Tradukarto**" negative eĥas al tiuj ĉi intencoj. Se ĝiaj kvar unuaj paĝoj estis promesplenaj, subite pro manko de loko, ĝi abrupte abortas. William Auld mem agnoskas tion per tiu ĉi frazo :

A.- "Tio ĉi estas nur recenzo, ne funda studaĵo, kaj tial mi povis nur skizi miajn pensojn." (fino de la citaĵo) Ĉu ankaŭ en revuo, kiu ĝuste metas en sia programo la aperigon de longaj recenzoj, oni ne pretas plenumi tiun ĉi programon pro timo uzi tro da papero. Ni estus preferintaj legi la anoncon "daŭrigota", kaj ni certe estus abonintaj la novan revuon por ricevi la anoncitan daŭrigon, pro la valoro de tiu recenzo. Sed ho ve, tio ĉi ne estos, kaj ni devos kontentiĝi je la skiza esprimo de la pensoj de la ĉefredaktoro.

Cl.- Nia juĝo estas eble iom severa. Sed verŝajne ĝi tamen esprimas vidpunkton, kiun oni rajtas havi koncerne revuon, kiu celas esti la reenkarriĝo de "Literatura Mondo".

A.- Revuo, kiu pretendas al beletrismo, devus atente elekti siajn publikaĵojn. Ekzemple la du paĝoj kiujn OOMOTO samtempe dediĉis al Edwin de Kock sub la titolo Dusemajna Specimeno havas poezian signifon, kiu superas la plimulton de la poemoj aperintaj en FONTO numero unua.

C1.- Kaj la prozaĵoj, kiuj nuntempe aperas en la revuo MONATO, interalie la noveloj de Johán Valano, inde lokiĝus en beletra revuo.

A.- Monata beletra revuo certe akcelus la beletran literaturon en Esperanto. Ĝi povus multe kontribui al dinamismigo de nia kulturo. Sed por tion ĉi atingi, ĝi devus alporti tion, kion pli ĝeneralaj revuoj ne povas alporti. La antologia formulo, kiun William Auld elektis, estus efika, nur se ĝi enkadriĝus en bone dokumentita ĉirkaŭaĵo. Tiam tiu ĉi revuo fariĝus unika instrument, kiun ĉiu beletremulo volos posedi. Tiam ĝi plenigus la vakuon, kiun la morto de "Literatura Mondo" lasis.

Cl.- Ni senpacience atendas la novembran numeron 1980-an de FONTO kaj la sekvontajn, por vidi ĉu efektive la nova "beletra revuo" estos nur sonĝo aŭ kontraŭe praktika instrumento nepre havinda. Tiurilate la unua numero oktobra ne alportas decidigan respondon. Bedaŭrinde, ĉar tio ne estas abon-instiga.

A.- Povu la espero de Marjorie Boulton tamen efektiviĝi per la revuo FONTO:

C1.- "...Mi sendas miajn
plej varmajn bondezirojn al
FONTO.
Mi esperas,
je ĝi longe ŝprucados;
ke el la verda ĉirkaŭaĵo fluos
kristale klaraj, freŝaj sanigaj akvoj.
Mi esperas,
ke la Muzoj,
kiuj tradicie favoras fonton en Grekujo,
kiun mi eĉ iam vizitis,
nun favoros ankaŭ
FONTON
en Brazilo,

kaj refreŝigos la tutan esperantistaron."

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond recenzis pri la nova revuo FONTO. Ĝis reaŭdo !

Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*